

Esperanto tra la Mondo



La listo de internaciaj renkontoj plilongiĝas...

— Turisma Esperanto restado, apud la mezepoka kastelo Zvikov, en Ĉeĥoslovakio, 7-14a de aŭgusto. Skribu al : Vlastivedné Muzeum (Turisma E-restado), Písek, Ĉeĥoslovakio.

— Feriaj Tagoj, en Ljubljana, 10-14a de aŭgusto (Jugoslavio).

— Hispana Esperanto Kongreso en Bilbao, 19-23 7, Barrencale Barrena 7, la dekstre, Bilbao 5.

En Budapeŝto : la arta festivalo.

Samtempe kun la kongreso, okazos arta festivalo kies programo inkluzivos prezentaĵojn de Internacia Arta Teatro, de Bulgara Esperanto-teatro, de teatro Populara de Lodz (la usona verko « Kataki », jam sukcese enscenigita dum la kongreso de Tokio). Ankaŭ estos prezento de la ŝtata pupoteatro de Budapeŝto, kies artistoj tute speciale lernis esperanton.

La kongresoj 67 kaj... 1968 prepariĝas.

— En Tel Aviv, la kongresa komitato de la Universala Kongreso de 1967 komencis labori : la internacia sekretario Sro Pompilio, restadis tri semajnojn en Tel Aviv. Okazis gazetara konferenco kaj intervjuoj en radio. Novaj esperanto-grupoj estis kreitaj.

— La estraro de U.E.A. akceptis la inviton el Madrid, por la kongreso 1968.

El Germana Demokrata Respubliko.

— Esperanto kunvenon dum la foiro de Leipzig partoprenis 150 personoj el diversaj landoj.

El Hindujo

— Bengala Esperanto-Instituto preparas vastan ekspozicion kiu okazos de la 20a ĝis la 24a de decembro. Sendu materialon, esperanto presaĵojn kaj informilojn en angla lingvo al : B.E.I. Sro L. Sinha, Vinaya-Bhavana, Santiniketan, W. Bengal, Hindujo.

El Hungario.

— Okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto, la hungara poŝto eldonos specialan poŝtmarkon en valoro de 1 forinto. Aliflanke, okaze de pluraj naciaj kongresoj, en diversaj landoj, speciala poŝtstampo estos uzita.

Fakaj asocioj.

— Fondiĝis « Internacia Historiista Fakgrupo » (IHFG). La korespondadreso estas : S-ro E. J. Görlich, Postfach 70, A-1094, Wien, Aŭstrujo.

— Radio-Amatoroj : en la internacia kunveno de radio-amatoroj en Knokke-Zoute, Belgio (16-18 de septembro 66) okazos renkontiĝo

de la esperantistoj. Adreso : Sro K. Poupeye, ON4PU, Karel de Stontelaan 78, Brugge.

— Tekstindustrio : Aperis la unua numero de « La teksumisto », por ĉiuj branĉoj de la teksumo fako. Adreso : Sro Manfred Führer, Pf. 153, CH-4900 Langenthal, Svisujo.

— Ornitologia Rondo Esperantlingva (O.R.E.) : revuo : « La Mevo ». Sekretario : L. Bechtold, 3568, Gladenbach, Hess. Forstamtb. Germanujo.

— Ĉu vi konas « Internacia Scienca Asocio Esperantista » ? Ĉu vi legas « Scienca Revuo » (jarabono : 30 steloj) ? Kontaktu la sekretariojn : I S A E, Zagrebačka 24, Sarajevo, Jugoslavio.

— En Belgujo kreiĝis nova organizo : « Esperanto en la Lernejo ». Adreso : S-ro Vanderlinden, Dorp 44, Astene-Deinze.

Eldonaĵoj.

— En Moskvo, aperis « Versoj Elektitaj » de la poeto Sergej Jesenin.

— En Hungario : nova eldono de « La tragedio de l'Homo », de Madach, traduko tute reverkita de Kalocsay.

— « El Japana literaturo » (pecoj de dudek aŭtoroj, plej parte verkitaj inter 1917 kaj 1928). Prozaĵoj kaj poemoj.

— Nova broŝureto de U.E.A. aperis : « La Esperanto Societo ». El ĝi, la grupestroj ĉerpos multajn ideojn por la vivo de niaj Societoj esperantistaj.

— La libreto de F. Faulhaber : « Ne tiel sed tiel ĉi ! » (konsiloj pri stilo).

— Ilustrita prospekto pri ceramiko (maŝinaro, produktaĵoj, ktp) el Ĉeĥoslovakio. Skribu al ZK Esperanto ... Prerovske strojirny, Prerov, Ĉeĥoslovakio.

— Kaj ne forgesu la luksan riĉe ilustritan turisman revuon « Ripozoj ». Adreso : Bulv. Tolbuhin 51, Sofio, Bulgario.

Statistikoj.

— Dum 1965, okazis 1807 radio-elsendoj en internacia lingvo, el 25 stacioj de 13 landoj.

— Laŭ cetero ne kompleta enketo, aperas ke minimume 1300 lokaj grupoj funkcias en 39 landoj.

— Oni nun preparas enketon pri sciencistoj-esperantistoj. Skribu al Sro Wim De Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo.

— Minimume 86 sciencaj kaj fakaj periodaĵoj eldonataj en diversaj landoj publikigis artikolojn aŭ resumojn de artikoloj en esperanto de post 1950.